# Kukola ovo



*Kiu respondo NE povus estas bona?*

**1) Kiam Jozefo matenmanĝas?**

a) Je la 7a horo, pli precize inter la 7a horo kaj la 7a horo 12 minutoj.
b) Por ne malsaniĝi.
c) Neniam.
ĉ) Kiam Maria diras al li, ke li altabliĝu.

**2) Kiel nomiĝas la edzo de Maria?**

a) La edzo de Maria nomiĝas: Jozefo Inteligenta; lia persona nomo estas Jozefo, lia familia nomo estas Inteligenta.
b) Ŝi nomiĝas Jozefo.
c) Li nomiĝas Jozefo.
ĉ) Lia nomo estas Jozefo.

**3) Kiel nomiĝas la filo de Maria kaj Jozefo?**

a) La filo de Maria kaj Jozefo nomiĝas Adamo.
b) Li nomiĝas Adamo Inteligenta, lia persona nomo estas Adamo, lia famlia nomo estas Inteligenta.
c) Lia nomo estas Adamo.
d) Li estas simpatia knabo.

**4) Kiel nomiĝas la hundo de la familio Inteligenta?**

a) Ĝi impresis tre bone.
b) Ĝi nomiĝas Cezaro.
c) Ĝia nomo estas Cezaro.
e) Cezaro.

**5) Kiu kuiras bone en la familio Inteligenta?**

a) Bone kuiras nur Maria.
b) Maria kuiras buljonon.
c) La edzino de Jozefo kaj la patrino de Eva kaj Adamo.
ĉ) Maria.

***6) Kia knabo estas Adamo?***

a) Li nun dormas.
b) Adamo estas knabo forta.
c) Adamo estas forta knabo.
ĉ ) Forta. Li estas forta knabo.

***7) Ĉu Jozefo estas hejme?***

a) Jes.
b) Hejme mi estis en Majo.
c) Jes, Jozefo estas hejme.
ĉ) Evidente, li estas hejme.

***8) Kiu dato estas hodiaŭ?***

a) La oka.
b) La oka de Januaro 2004.
c) La 8a de januaro/Januaro de la jaro 2002a.
ĉ) Dudek naŭ gradoj.

***9) Kiu loko estas la plej bela en via lando?***

a) La norda bordo de la maro.
b) Inter Oktobro kaj Decembro.
b) La ĉefurbo.
ĉ) La montaro.

***10) Kiel statas via sano?***

a) Mia patrino fartas tre malbone.
b) Dankon, bone.
c) Dankon, tolereble.
ĉ) Ĉio estas en la plejeble granda ordo

***11) Kial vi venis, Andreo?***

a) Plej ofte inter la 6a 30 kaj la 8a kaj 20.
b) Por rakonti al vi, kio okazis hieraŭ.
c) Por ke ni iomete babilu, ja tre malofte ni renkontiĝas..
ĉ) Simple por renkontiĝi kun vi.

***12) Kiel fartas Jozefo en la nova hejmo?***

a) Li kaj lia edzino feriis iam antaŭlonge ĉe Balatono.
b) Li fartas tie tre bone
c) Nu, vi mem povas imagi: li fartas vere bone.
ĉ) Ŝi aspektas sana.

***13) Kie vi kaj via amiko estos dum Kristnasko?***

a) Ĉe miaj gepatroj aŭ ĉe liaj geavoj
b) En bela montaro, kie oni povas skii.
c) De la oka horo dudek ĝis la oka horo tridek.
ĉ) En Prago, Budapeŝto, Romo aŭ Varsovio.

***14) Kiel vi pasigis la Kristnaskon?***

a) Mi estis kun miaj gepatroj ĉe miaj geavoj, en bela montara vilaĝo, kie mia patrino naskiĝis.
b) Mia persona nomo estas Brigitta, sed miaj geamikoj uzas miajn karesnomojn: Brigi, Briginjo, Briginjeto, hungare ankaŭ Brigike.
c) Mi kaj mia amiko tutan tagon skiadis en montaro, poste, vespere, ni gastis ĉe liaj gepatroj.
ĉ ) Ni matene partoprenis meson, poste ni vizitis la geonklojn, vespere ni disdonis niajn donacojn hejme.

***15) Kiel nomiĝas la filineto de Maria kaj Jozefo?***

a) Tre bone.
b) Eva.
c) Eva Inteligenta. Eva estas la persona nomo, kaj la familia nomo estas – Inteligenta.
ĉ) Eva Inteligenta, kiel vi scias.

***16) Kiam estas, kutime, varma vetero? Kiam estas varme?***

a) Somere.
b) Dum someraj tagoj.
c) Por amuziĝi.
ĉ) Fine de printempo, somere, komence de aŭtuno.

***17) Kiam vi ricevis mian leteron?***

a) Vian leteron mi ricevis la 24an de Februaro 2002a, lunde, je la 10a horo 35 minutoj.
b) Mi ricevis ĝin la 5an aŭ la 6an de Julio
c) Ĉar mi estis hejme.
ĉ) Antaŭ tri aŭ kvar semajnoj